# Esperanto estas taŭga lingvo por artefaritaj intelektoj (parolrobotoj)

(Pierre Dieumegard, pierre.dieumegard@free.fr, 2025-09-09)

De pluraj jaroj oni parolas pri artefaritaj intelektoj, kiuj kapablas paroli (aŭ skribi) tiel flue kiel homoj, babilrobotoj kiel ChatGPT, Copilot, Gemini kaj aliaj.

Ĉu ili kapablas babili en la internacia lingvo Esperanto ? Kaj se jes, ĉu ili kapablas tion fari pli bone, aŭ malpli bone, ol en aliaj lingvoj ?

En tiu verko temas pri ĝeneralaj retaj servoj, senpagaj, en kiuj estas linio por tajpi demandon : post kelkaj sekundoj, ni ricevos respondon en kelkaj linioj. Se ni deziras pliajn precizojn, ni tajpu novan demandon, por peti klarigojn pri la ĵus donita respondo.

Jen listo de provitaj retejoj : Google Gemini, Microsoft Copilot, grok.com, chatgpt.com, claude.ai, mistral.ai, deepseek.ai, perplexity.ai, duckduckgo.com (kiu uzas aliajn artefaritajn intelektojn).

## Enhavo

1 Ĉiuj artefaritaj intelektoj jesas por babili en Esperanto....1
1.1 ChatGPT, la plej konata kaj la plej konciza....1
1.2 Mistral AI, Perplexity.ai kaj Google Gemini, ankaŭ koncizaj....2
1.3 Duckduckgo kapablas demandi al pluraj aliaj AI....2
1.4 Microsoft Copilot reklamas por FEL....2
1.5 Grok : detalaj respondoj, kiuj montras memoron de aliaj demandoj....2
1.6 Deepseek, malpli konciza, sed afabla....3
1.7 Claude.ai, parolema kaj iel tro laŭda....3
2 Sed ili foje rifuzas por aliaj lingvoj, ekzemple la okcitana....4
2.1 Du en naŭ rifuzas babili en la okcitana....4
2.2 Kial la okcitana estas malpli uzebla de AI ol Esperanto ?....5
Ĉar dosieroj kaj libroj estas malpli nombraj en la okcitana ol en Esperanto....5
Ĉar estas diversaj variantoj/dialektoj de la okcitana, kiuj malfaciligas laboron de la parolrobotoj....5

Eŭropo Demokratio Esperanto

Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) estas politika movado, kiu pledas por adopto de Esperanto kiel komuna kaj justa lingvo.

Kontaktu nin:
https://e-d-e.org kontakto@e-d-e.org

# 1 Ĉiuj artefaritaj intelektoj jesas por babili en Esperanto

La demando estis simpla : *Ĉu vi povas respondi en Esperanto ?*. Respondo povas esti jes aŭ ne, sed kutime estas pliaj frazoj.

Ĉiuj retejoj jesis, concize aŭ malkoncize.

## 1.1 ChatGPT, la plej konata kaj la plej konciza

*Jes, kompreneble! Mi povas respondi en Esperanto. Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*

## 1.2 Mistral AI, Perplexity.ai kaj Google Gemini, ankaŭ koncizaj

Mistral : *Jes, mi povas respondi en Esperanto. Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*

Perplexity.ai : *Jes, mi povas respondi en Esperanto! Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*


Gemini : *Jes, mi povas respondi en Esperanto. Mi estas preta helpi vin. Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*

## 1.3 Duckduckgo kapablas demandi al pluraj aliaj AI

GPT-4o mini
*Jes, mi povas respondi en Esperanto! Kiel mi povas helpi vin?*

Llama 4 Scout
*Jes, mi povas respondi en Esperanto. Kio estas via demando?*

## 1.4 Microsoft Copilot reklamas por FEL




*Provoj de Microsoft Copilot (Esperanto kaj okcitana lingvo)*

*Jes, mi povas respondi en Esperanto!* 😊

*La retejo de **Flandra Esperanto-Ligo (FEL)**, kiun vi vizitas, estas tre riĉa je enhavo por esperantistoj. Jen kelkaj el la ĉefaj sekcioj kiujn vi povas esplori:*

Noto : tiu AI memoras ke mi ĵus vizitis la retejon de FEL per la krozilo Microsoft-Edge.


## 1.5 Grok : detalaj respondoj, kiuj montras memoron de aliaj demandoj

*Jes, mi povas respondi en Esperanto. Mi faros mian plej bonan por provizi utilajn, helpemajn kaj praktikajn respondojn. Vi jam demandis ĉi tion antaŭe, sed mi estas preta respondi denove. Ĉu vi havas novan demandon aŭ temon, kiun vi volas diskuti en Esperanto?*
*Jes, mi povas respondi en Esperanto. Mi jam faris tion antaŭe. Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*

*(Mi ankaŭ povas provi respondi en aliaj lingvoj, kiel okcitana, se vi deziras.)*

Noto : fakte mi jam demandis al Grok ĉu ĝi kapablas respondi en Esperanto, kaj ĝi jam jesis. Mi ankaŭ demandis ĉu ĝi kapablas respondi en la okcitana, kaj ĝi jesis : pro tio ĝi citas tiun lingvon.

## 1.6 Deepseek, malpli konciza, sed afabla




*Provo de Deepseek*


*Jes, mi povas respondi en Esperanto!* 😊 *Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ?*

*(Se vi havas iujn ajn demandojn pri Esperanto aŭ ion alian, estu libera demandi!)*

## 1.7 Claude.ai, parolema kaj iel tro laŭda

*Jes, mi kapablas respondi en Esperanto! Mi povas komuniki en tiu internacia lingvo. Kiel mi povas helpi vin hodiaŭ? Ĉu vi volas diskuti ion specife en Esperanto, aŭ ĉu vi simple volis testi miajn kapablojn en tiu lingvo?*

*Mi ĝojas, ke vi uzas Esperanton - ĝi estas bela kaj interesa lingvo kun riĉa historio kaj komunumo.*




*Parolroboto Claude pri Esperanto*

# 2 Sed ili foje rifuzas por aliaj lingvoj, ekzemple la okcitana

Certe tiuj artefaritaj intelektoj kapablas babili en grandaj lingvoj, kiuj havas multajn parolantojn, kaj kiuj estas uzataj kaj subtenataj de potencaj registaroj. Sed kio okazas en malgrandaj lingvoj, sen registara subteno, sen tradukoj kaj sen lerniloj aŭ gramatikaj libroj?

Ĉar mia patrino naskiĝis en medio kie oni parolis okcitanan lingvon, mi provis fari similan demandon "*Ĉu vi povas respondi demandojn en la okcitana?*" ("*Podètz respondre a las questions en occitan?*").


## 2.1 Du en naŭ rifuzas babili en la okcitana

Grok, ChatGPT, Claude, Deepseek, Copilot, Perplexity kaj DuckDuckgo respondis jese, per frazoj kiel "*Òc, pòdi respondre a las questions en occitan! Se volètz pausatz vossas questions, vos respondrai dins aquesta lenga.*" ("*Jes, mi povas respondi la demandojn en la okcitana. Se vi volas fari viajn demandojn, mi respondos al vi en tiu lingvo*").

Same kiel en Esperanto, Claude.ai estis laŭdema : "*Soi content que parlatz aquesta bèla lenga..*" ("*Mi estas kontenta ke vi parolas tiun belan lingvon..*")

Sed Google Gemini tuj diris en la franca "*Malheureusement, je ne parle pas l'occitan. Je suis capable de communiquer en plusieurs langues, mais l'occitan ne fait pas partie de celles que je maîtrise pour le moment. Je peux vous répondre en français, en anglais, ou en esperanto, si vous le souhaitez.*", kies signifo estas "*Bedaŭrinde mi ne scipovas la okcitanan. Mi kapablas komuniki en pluraj lingvoj, sed la okcitana ne estas en la lingvoj kiujn mi nun scipovas. Mi povas respondi al vi en la franca, en la angla, aŭ en Esperanto se vi deziras.*"

Ni ne tro riproĉu Google Gemini : tiu parolroboto estas pli fidinda ol aliaj, kiu donas malpli da malbonajn respondojn ol aliaj. En esploro de Newguard (aŭgusto 2025)[1], proporcio de malbonaj informoj estis duono de tiuj el Grok, Mistral, Copilot aŭ ChatGPT. Rifuzi respondi kiam oni ne estas certa estas laŭdinde.




*Respondo de Google Gemini al demando en okcitana lingvo*

Mistral respondis en la okcitana ke ĝi ne kapablas respondi en tiu lingvo : "*N'ai pas la capacitat de respondre en occitan. Te pòdi ajudar en francés o en anglés.*", kies signifo estas : "*Mi ne kapablas respondi en la okcitana. Mi povas helpi vin en la franca aŭ en la angla.*"

## 2.2 Kial la okcitana estas malpli uzebla de AI ol Esperanto ?

### Ĉar dosieroj kaj libroj estas malpli nombraj en la okcitana ol en Esperanto


La okcitana estas regiona lingvo de Francio (eĉ se estas iuj parolantoj en aliaj landoj). Do estas tradukoj, lernolibroj kaj universitataj esploroj en la franca. Sed verŝajne ili estas malnombraj en aliaj lingvoj, ekzemple ne estas multaj lernolibroj  aŭ gramatikaj libroj de la okcitana en la svahila aŭ en la germana, kaj ne estas multaj infanrakontoj el la okcitana en la japana aŭ en la rusa.

Esperanto estas internacia lingvo. Malŝatantoj de tiu lingvo ridas pri tiu aserto, sed fakte tiu aserto veras. Estas instrulibroj kaj vortaroj de Esperanto en multaj lingvoj (ekzemple svahila, germana, japana, rusa, kaj multaj aliaj), kaj ofte la dosieroj estas libere alireblaj en interreto, do la robotoj de artefaritaj intelektoj povas facile trovi ilin por trejniĝi.

1 https://www.lesechos.fr/tech-medias/intelligence-artificielle/ia-quels-sont-les-chatbots-qui-propagent-le-plus-de-fake-news-2184451

## Ĉar estas diversaj variantoj/dialektoj de la okcitana, kiuj malfaciligas laboron de la parolrobotoj

Pluraj parolrobotoj, post jesi la demandon pri la okcitana, diras ke ili povas provi respondi en iuj sublingvoj, ekzemple ChatGPT "*De quina mena de occitan preferissètz? Lengadocian, provençau, auvernhat, gascon...? Se sabètz pas, cap de problèma, pòdi utilizar un occitan estandard o adaptat a vòstre tèxt.*" ("*Kiun okcitanan lingvon vi preferas? Langvedocian, provencan, aŭvergnan, gaskonan...? Se vi ne scias, neniu problemo, mi povas uzi norman okcitanan aŭ adaptitan al via teksto.*"). Same faras Claude : "*Compreni lo provençau, lo lengadocian, lo gascon e d'autres varietats de l'occitan, benlèu que ma coneissença siá pas perfecta per totas las nuanças regionalas.*" ("*Mi komprenas la provencan, langvedocian, gaskonan kaj aliajn variaĵojn de la okcitana, eble mia scio ne estas perfekta por ĉiuj regionaj nuancoj.*") kaj Deepseek : "*Pòdi respondre a sas questions en occitan — que siá en provençau, lengadocian, gascon o quina que siá la varietat de la lenga.*" ("*Mi povas respondi viajn demandojn okcitane — ĉu provence, langvedocie, gaskone aŭ kia ajn lingvovarianto.*").




*Respondo de ChatGPT al demando en okcitana lingvo*

Do la robotoj ne estas certaj kapabli bone respondi en la taŭga lingvovarianto.

Male, Esperanto estas pli sekura por parolrobotoj, per sia gramatiko bone konata per la "Fundamento de Esperanto". Neniam parolroboto demandis "kiun varianton de Esperanto vi deziras de mi?".

**Konklude, ni povas diri ke Esperanto estas taŭga lingvo por artefarita intelekto : la parolrobotoj kapablas babili per tiu lingvo, eĉ se ili ne estas specife programitaj por Esperanto, kaj eĉ se ili foje eraras aŭ mensogas pri iuj asertoj, en Esperanto same kiel en aliaj lingvoj.**